
# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 2 (881) • 2010 •

DIA REGNO

ISSN 0167-9554



**KELI**
**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto**: Philippe COUSSON
🖂 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021;
💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel POLNICKÝ;
🖂 Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio
✆ +420 325 615 651; 💻 cea.polnicky@quick.cz

**Kasisto**: Siegfried KRÜGER
🖂 Claudiusweg 10,
DE 74074 Heilbronn, Germanio
✆ +49 7131 162688;
💻 siegfriedkrueger@arcor.de

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI ĉe ING Bank N.V.: 5506132. Kontonomo: INT CHR ESPERANTO BOND - KELI - BIC: INGBNL2A; IBAN: NL86INGB0005506132

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
🖂 Västergårdsg 15; 256 64 Helsingborg; Svedio;
✆ +46 (70) 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec

## ENHAVO

| | |
|---|---|
| Pasko, pentekosto | 27 |
| Vojmontrilo sur la lasta viv-etapo | 28 |
| Informo pri nia kongreso 2010 | 29 |
| Kuracistoj de la Islamo Al-Razi kaj Avicenna | 30 |
| La ĉarto por kompato | 34 |
| Kruco kiel kristana simbolo | 36 |
| Diservo kaj grupoprocezo | 40 |
| Preĝo por ĉiu tago | 44 |
| Ŝercoj kolektitaj (2) | 45 |
| Informetoj | 46 |
| Amo neniam pasas | 48 |

## REDAKTORAJ VORTOJ

Preskaŭ fariĝis kutimo ke la numero 2 de Dia Regno malfruas. Denove mi devas pardonpeti pro tio. Kompreneble estas diversaj kaŭzoj kaj ĉi-foje la plej grava kaŭzo estis la tempa konflikto inter libervola tasko kaj la salajrdona laboro. Sed...

...jam pasis la Pasko kaj ni atendas la Pentekoston. La printempo venas kun bela vetero kaj espero pri nova vivo en la ĝardeno kaj la naturo. Ankaŭ en nia postpaska kristana vivo ni atendas riĉan vivon post la resurekto de nia Sinjoro, kiu forlasis la krucon, kaj la alveno de la Sankta Spirito. Ĉi-numere de nia revuo, mi iom esploras pri nia kruca simbolo, kiun ni ĉiutage uzas, ofte tute senkonscie, ekzemple en kelkaj naciaj flagoj, per juvelaĵoj k.t.p. Espereble estas interesa legado por multaj.

# Pasko, Pentekosto




2. Por ke ni ne estu solaj en la mondo,
   nek ludil' de ĉia ondo,
   Li elsendis la Spiriton de l' ĉielo
   el la am' de l' Dia kor'.

3. En la amo de l' Spirito, lia forto,
   ni pilgrimu ĝis la morto.
   Kristo vokos ankaŭ nin el nia tombo
   al la viv' en Dia glor'.

M (Tiritomba): el Italujo
E (originale verkita): Albrecht Kronenberger 2010-03-31

# Vojmontriloj sur la lasta viv-etapo

Jacques TUINDER, NL

ĈIU KELI-ANO POVAS same facile kiel bedaŭrinde konstati, ke multaj el niaj karaj membroj pli kaj pli grizhariĝas kaj eĉ senhariĝas. Nu, kion fari? Por trovi la vojon en la labirinto de la vivo, la ĉielo donis al ni 'mapon', kiun ni konas kiel Dekalogon. Temas pri la Dek Ordonoj, kelkfoje nomataj ankaŭ "oraj donoj", ĉar nesufiĉe alte takseblaj donacoj, urĝe bezonataj kompas-similaj vojmontriloj.

En revuo por pli aĝaj homoj mi trovis analogi-sence 'dekalogon', kiu receptas maljunaĝon sukcesan kaj benitan. Certe estas bona materialo por meditaĵo; sekve mi tradukis ĝin por nia legantaro.

1. Ne tro multe kaj tro emfaze parolu pri via sanstato kaj viaj malfacilaĵoj. Kaj tio nepre ne kun parencoj kaj homoj, kun kiuj vi havas frekventan kontakton. Pri ĉi ĉio nur via kuracisto vere interesiĝas.
2. Bone kaj zorge pripensu ĉion kion vi intencas fari, por ke via subkonscio ne diktu al vi strangaĵojn, kiel ekzemple stoki viajn okulvitrojn en la fridujon aŭ preni kuleron por ŝlosi la pordon.
3. Ne daŭre rakontu pri viaj pasint-tempaj atingoj kaj sukcesoj. Homoj ĝenerale pli interesiĝas pri si mem kaj ŝatas aŭdi aferojn kiuj koncernas la hodiaŭon kaj morgaŭon.
4. Prizorgu serioze kaj vian internan kaj vian eksteran flankon. Bone lavu kaj elegante vestu vin, por ke vi sentu vin agrabla kaj memfida, kaj estu certa pri pli da respekto.
5. Iom post iom senigu vin de ĉirkaŭaj homoj kaj aĵoj, kun kiuj vi dumvive estis firme ligitaj. Jen la granda sekreto fariĝi saĝulo kaj poste morti la morton de justulo.
6. Lernu esti 'sola' kaj ne dediĉu tempon al senvaloraĵoj. Silento kaj soleco inspiras kaj instigas al pensado kaj ĉiel estas fekunda grundo por preĝado kaj meditado.
7. Rekomendinde estas utiligi taglibron por enskribi gravajn okazintaĵojn kaj trafajn pensojn. Tio helpos al vi pli bone ekkoni kaj kompreni vin mem kaj aliajn homojn.
8. Estu sobra rilate al manĝado kaj trinkado. Dumtage preferu moviĝadon ol sidadon. Certe via korpo pli bonfartos kaj dankos al vi, sed tio vigligos ankaŭ vian menson.

9. Klopodu montri sinceran interesiĝon pri la homoj, kiujn vi renkontas. Servu al ili kaj helpu ilin laŭ viaj eblecoj. Sed mallernu ĉiam kaj ĉie atendi laŭtan dankvorton.

10. Pensu pri la morto en plena kvieteco kaj ĉiela sereneco, sed ne ofte parolu pri ĝi. Vi scias ke aliaj frue aŭ malfrue atendas vian morton, kelkfoje ĝin eĉ esperas.

---

# BEREGDARÓC

2:a – 9:a de aŭgusto 2010

Miaj karaj gefratoj,

BEREGDARÓC ESTAS ĈARMA, malgranda vilaĝeto kaj nia kongresejo estas moderna, bela kaj bonekipita. Do ĉiuj "eksteraj" kondiĉoj estas taŭgaj, ke ni havu bonan kongreson.

Sed la riĉecon de nia kongreso ni mem devas aldoni! La enhavo de la kongreso ne pleniĝas "nur", "de si mem"! Estas nia respondeco, kiel riĉa kaj fruktodona estos nia kunestado.

La temo de nia kongreso bedaŭrinde ankaŭ hodiaŭ estas ege aktuala:

"*Inter ili neniu havis mankon.*"
Agoj 4.34

Ni elektis tiun temon aliĝante al la propono de la Eŭropa Unio kiu en la jaro 2010 proponis la temon batalon kontraŭ la malriĉeco kaj segregado.

Certe vi legis artikolojn, raportojn en la gazetoj de via lando – rakontu pri ili al la aliaj kongresanoj! Se estas 10-15 minutoj aŭ 1 horo – la longeco ne gravas!

Mi dankus, se tiu, kiu havas ideon kaj ŝatus prelegi, informus min pri la temo kaj proksimuma longeco, por ke mi povu iom ordigi la horaron de nia kunestado.

En la sekvonta Dia Regno vi trovos ĉiujn bezonatajn informojn pri la vojaĝ-eblecoj kun la horaroj de trajnoj kaj busoj.

Do ĝis revido en Beregdaróc!
*Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS*

---

La daŭrigo de la listo de la partoprenantoj:

| | | |
|---|---|---|
| 37. | Anna LANDFORS | Svedio |
| 38. | Mats LANDFORS | Svedio |
| 39. | Hyeronimus STROINSKI | Germanio |
| 40. | Monika STROINSKI | Germanio |
| 41. | Gerda DERCKS | Nederlando |
| 42. | Zsuzsanna TÓTH | Hungario |
| 43. | Ruth v. PUIJENBROEK | Svislando |

# Kuracistoj de la Islamo Al-Razi kaj Avicenna

## Skizoj pri filozofoj-kuracistoj, III.

Endre Dudich, NL

### *Allah igas vivi kaj morti*

**Historia fono**
Fine de la 5-a jarcento la latin-lingva Okcident-romia Imperio kolapsis sub la kreskanta premo de la Gotoj. Male, la grek-lingva Orient-romia, Bizanca Imperio persistis kaj prosperis. Ĝi regis eĉ super Norda Afriko. Oriente la ekonomia, ideologia kaj milita konflikto kun la Persa Imperio de la Sasanidoj daŭris, kun varia sukceso. Do fakte ekzistis iaspeca dinamika ekvilibro.

Tiun ekvilibron draste renversis la apero de la historia fenomeno nomita Islamo.

Kvin jarojn post la forpaso de la granda imperiestro **Justiniano**, en la jaro 571 p.Kr., en la Araba tribo *qarais* naskiĝis knabo, kiu ricevis la nomon **Muhammad** / **Mohamedo**.

**Muhammad ibn Abd'Allah** estis jam 40 jarojn aĝa, sukcesa komercisto, kiam li ricevis la unuan revelacion de la spirito de Dio. Komence li rezistis kaj volis eviti la pezan kaj danĝeran taskon, kiel ankaŭ la plejmulto de la Hebreaj profetoj de la Malnova Testamento. Finfine li kapitulaciis kaj akceptis sian destinon. Tiel li iĝis profeto, *nabi*, peranto de la mesaĝo de Dio al la homoj, kaj sendito, *rasul*, de Dio. (Ĉi-lasta termino havas la saman signifon kiel la greka *apostolos*.)

La esenco de la mesaĝo de Dio, **Alláh**, estis la postulo de la plej strikta monoteismo. *"Dio estas unu, sola kaj unika, kiu ne generas kaj ne estas generata."*

En 622 la Profeto migris el Mekko al la urbo Jathrib. Tiu estis ricevonta la nomon Medinat al-.nabijji, „urbo de la Profeto" ( poste simple Medina.). Tiu evento estis la *hiĝra*, kaj tiu jaro 622 iĝis la komenca jaro de la moslima kalendaro. En 630 **Mohamedo** konkeris Mekkon, kaj en 634 mortis. (Paco estu kun li!)

Sub la gvidado de la kalifo **Omar** (634-644) la Araboj konkeris Sirion, Irakon kaj Egiption. La urbo Damasko iĝis ĉefurbo de la dinastio de la Omajadoj.

En la jaro 750 sekvis la dinastio de la Abasidoj. Bagdado estis la nova ĉefurbo. Dum la regado de la fabela, tamen reale ekzistinta kalifo **Harun al-Raŝid** (786-809) en la tiel nomata Domo de Saĝeco komenciĝis granda traduk-laboro. Fakuloj tradukis la antikvajn Sanskritajn, Grekajn, Persajn, Siriajn kaj Armenajn verkojn en la Araban lingvon. Tiu lingvo iĝis la lingvo ne nur de la religio (de la sankta libro Korano) kaj de la diplomatio, sed ankaŭ tiu de ĉiuj intelektuloj, filozofoj, kuracistoj

ktp., sendepende de ties gepatra lingvo.

Nur unu kaj duonon da jarcento post la forpaso de **Mohamedo**, la Arablingva imperio de la Islamo konsistanta el tri kalifatoj (tiuj de Bagdado, Kairo kaj Kordobo) etendiĝis de la landlimo inter Persio kaj Ĉinio en Azio ĝis la Pireneoj en Eŭropo. Dum la 9-12-a jarcentoj la scienco en la mondo de la Islamo estis ĉiuaspekte multe pli altnivela ol en Okcidenta Eŭropo.

## Abu Bakr Mohammad Ibn Zakarijja al-Razi (Razes)

845 – 930 p.Kr., aŭ 865 – 925



Eŭropa bildo de la 13a jarcento, trovita en biblioteko en Toledo, Hispanio

Lia naskiĝurbeto troviĝas en Persio, proksime al Teherano.

**Al-Razi** estis jam 30 jarojn aĝa, kiam li komencis okupiĝi pri medicino. Lia majstro estis **Rabban al-Tabari**. De li **al-Razi** lernis ankaŭ filozofion.

1. Li sumigis la konojn de la antikva Greka-Romia kuracarto, kaj multaspekte superis ilin. Li iĝis diektoro de la hospitalo de la ĉefurbo Bagdad. Li okupiĝis krom la kuracado de la korpo ankaŭ pri la sanigo de la animo. Li estas konsiderata kiel la unua klinikisto. La t.n. nederlanda skolo de kuracistoj ĉerpadis el liaj verkoj ĝis la 16-a jarcento.
2. **Al-Razi** estis elstara pioniro de la t.n. *jatrokemio*, t.e. medicina kemio, (La Greka vorto *jatros* signifas kuraciston.) Li uzis amonion, kaj verŝajne sukcesis produkti sulfuran acidon.
3. **Al-Razi** esprimis sin pro la graveco de eksperimentado kaj pro la libera uzo de la intelekto. Ĉi-rilate li estis antaŭulo de **Albertus Magnus** (Sankta Alberto la Granda).

   La listo *Fikrist* mencias 12 verkojn de **al-Razi**, sed konserviĝis nur du:

   *Libro pri la Sekreto de Sekretoj*

   *La Sekreto de Kreado.* – Tiu ĉi enhavas ankaŭ la faman *Smeraldan Tabulon*.
4. Kiel praktika alkimiisto, **al-Razi** uzis multajn laboratoriajn procedurojn. La ĉefaj estas: purigo, apartigo, dissolvo kaj senakvigo.

   La celo estis evidente la ĉionkuracanta eliksiro.
5. Kiel teoria alkimiisto, **al-Razi** opiniis ke la metaloj havas sekson.
   - Viraj estas: oro, fero, plumbo
   - Virinaj estas: arĝento, stano.
   - Duseksa estas hidrargo.

   Laŭ lia koncepto sulfuro fekundigas hidrargon. Tiel naskiĝas la ceteraj metaloj kaj la aliaj mineraloj, kiuj estas fakte "neperfektaj metaloj".
6. Kiel filozofo, **al-Razi** rekonis kvin principojn. Jen:

La Kreanto
La Mondracio
La pramaterio
La absoluta spaco
La absoluta tempo.

Pro la du lastaj, oni konsideras lin antaŭulo de **Isak Newton**.

Laŭ **al-Razi**, la kreado estas eterna procezo: Dio neniam estas nenifara. Tiu koncepto konformas al la *creatio continua* (kontinua kreado) de **Sankta Tomaso de Akvino.**

## Abu Ali al-Husein ben Abdallah ibn Sina-e Balkhi (Avicenna)



Statuo en Duŝanbeo, Taĝikio

**Avicenna** naskiĝis en 1037 p.Kr. en la urbo Afsane/Afsen de la provinco de Buĥaro, Persio (nuntempe Uzbekio). Dek-jara, li parkere sciis kaj recitis la tutan Koranon, kaj studis jam plurajn filozofiajn verkojn. Dekses-jara, li asistis en la kuracado de sultano **Bin Mansur** en Buĥaro, kaj libere uzis ties bibliotekon. Dudek-jara, post la forpaso de sia patro, li forlasis sian naskiĝurbon kaj migradis de loko al loko.

**Avicenna** kompilis sciencan enciklopedion, kaj verkis entute 450 (!) librojn. Lia Kanono de la medicino (*al-Kánún fi Tíb*) konsistanta el kvin volumoj akiris plurcentjaran famon. Ĝi havis pli ol 30 eldonojn, kaj la latina traduko servis kiel lernolibro por la studentoj de medicino en ĉiuj eŭropaj universitatoj. La plej bona latina traduko aperis en 1652, do pli ol sescent jarojn post la morto de la aŭtoro, la "Princo de la Kuracarto".

## Skize pri la enhavo

Certe indas prezenti, almenaŭ skize, la enhavon de la Kanono
[laŭ wikipedia.org.wikik/Avicenna]

**Avicenna** enkondukas la bazajn fiziologiajn kaj patologiajn konceptojn. Laŭ li, la homa organismo povas esti sana, malsana, kaj en intermedia stato (malfortumo, hungarlingve gyengélkedés). La sanon influas unuflanke la naturaĵoj (la membroj kaj organoj de la korpo), kaj aliflanke la ne-naturaĵoj (manĝaĵoj, trinkaĵoj, aero, dormo, psiĥa stato, vetero, sezonoj de la jaro ktp.) Li speciale priatentis la ne-naturaĵojn, ĉar tiuj estas kontroleblaj.

**Avicenna** distingis kaj karakterizis plurajn tipojn de pulzo, uzante ilin por fari diagnozon. Li detale pritraktis la rolon de la vivmaniero en la prevento kaj en la rehabilitado (variaj dietoj, kurac-gimnastiko, aktiva kaj pasiva ripozo). La doloro estas mildigebla per malvarmego kaj per diversaj substancoj aplikataj ĉu interne (piloloj, siropoj ktp.), ĉu ekstere (kremoj, balsamoj, enpakaĵoj ktp. Por kuraci putriĝintajn

vundojn **Avicenna** uzis specialan fung-aĵon, antaŭaĵon de la penicilo kaj ceteraj antibiotikoj.

Li proponas iun kuracilon/medika-menton por ĉiu malsano, priskribas la dozigon kaj la flankefikojn. En la verko estas priskribitaj pli ol 8.000 kuracefikaj substancoj mineral-, plant- kaj animal-devenaj. Ili estas ordigitaj laŭ la sinsekvo de la literoj de la araba alfabeto.

Memstara parto estas dediĉita al la internaj organoj, iliaj malsanoj kaj ties simptomoj. Eminentan lokon okupas la okuloj. La Kanono traktas ankaŭ mal-sanojn de la cerbo. Tiuj estas ekz. disturboj de la dormo, amnezio (manko de memorio), apopleksio, epilepsio, neŭrozoj, cerbaj abscesoj. Pro tio **Avicenna** estas konsiderata ankaŭ pioniro de la psikoanalizo kaj psiko-terapio.

Apartaj ĉapitroj okupiĝas pri ginekologio (virinaj malsanoj), akuŝo-logio (nasko), flegado de beboj, pediatrio (infan-malsanoj), malsanoj de la ostoj, kirurgio (operacioj), brul-vundoj, infektoj kaj antidotoj (kontraŭ-venenoj).

*

Kiel filozofo, **Avicenna** eliris de la doktrino de la *sufi* majstro **Abu Nasr al-Farabi** (870 – 950). Sed li baldaŭ deturnis sin de ties novplatonismo kaj returnis sin al la realisma filozofio de **Aristotelo**.

Jen la esencaj tezoj de la filozofio de **Avicenna:**

- La pura *potencio* (nura ebleco) estas la materio, kaj la pura ago (*actus*, kompleta perfekteco) estas Dio.
- La ekziston de Dio pruvas ĝuste tio, ke nur Li estas nepra (ĉar absoluta), ĉio alia estas kontingenta (ĉar relativa).
- Dio estas nepre unu.
- Ĉio dependas de Dio kaj ekzistas per Dio, kiu estas eterna.
- De Dio derivas la Mondracio, kiel la unua movanto.
- La kreado estas plurgrada, produk-tanta la t.n. aktivan intelekton.
- La tempo kaj la moviĝo estas senĉesaj – senfinaj potence.
- La homo havas pasivan (ricevan) intelekton, kaj lia celo estas unuiĝi kun la aktiva intelekto, kaj per tio kun Dio.

**Avicenna** pasigis la lastajn 14 jarojn de sia vivo en urbo <u>Isfahano</u>, kiel kortega kuracisto de araba emiro (princo): Li mortis en la urbo <u>Hamadano</u> en norda Persio, disdoninte sian tutan havaĵon kaj liberiginte siajn sklavojn.

Por la kristana Eŭropo la Islamo prezentis danĝeran defion en ĉiuj rilatoj… milite, politike, filozofie, religie kaj science.

- La militan kaj politikan kontraŭ-atakon realigis la krucmilitoj.
- La filozofian kaj teologian danĝeron forigis la eminentaj skolastikuloj, **ĉefe Albertus Magnus (Alberto la Granda)** kaj **Sankta Tomaso de Akvino**
- La sciencaj konoj kaj inventaĵoj iĝis laŭgrade alproprigitaj kaj pli-disvolvitaj. Pri tio temos la sekvonta prelego.

# La ĉarto por kompato

Jacques TUINDER, NL

DUM UNU MONATO Karen Armstrong vizitis dek kvin usonajn urbojn, reflugis al sia hejmo en Londono por tuj poste sin anonci en Nederlando. "Vivi el kofro ne estas agrable", ŝi diras en la biblioteko de sia Amsterdama hotelo. "Estas sufiĉe elĉerpige, dum miaj jaroj ne plu estas tiom junaj. Sed tio estas parto de mia vivo!" Ŝi multe vojaĝas ire kaj revene inter Usono kaj islamaj landoj: Pakistano, Malajzio, Egiptio.

Jes, Karen Armstrong estis en Nederlando. La 12-an de novembro 2009 prezentiĝis en Amsterdamo la Ĉarto por Kompato (www.charterforcompassion.org). Bedaŭrinde ĉi tiu iniciato fariĝis ankoraŭ tro malmulte konata en 'la granda mondo'. Eble la internacia lingvo Esperanto kun sia interna ideo povus iom kontribui al ĝia disvastiĝo. La ideo sendube estus ege kara al Homarano Zamenhof! Nur pensu pri la ora regulo de Hillel!

La energia angla teologino kaj verkistino, Karen Armstrong – ŝi naskiĝis 1944 en Wildmoor – iniciatis lanĉi ĉi tiun Ĉarton. Ŝi restadis inter 1962 – 1968 en brita monaĥinejo, estas la aŭtorino de famaj verkoj pri mondreligioj kaj arda pledantino por dialogo kaj renkontiĝo. Laŭ ŝi al ĉiuj religiaj kaj etnaj tradicioj estas komune, ke ili atribuas – surbaze de 'la ora regulo' – gravan rolon ĝuste al kompato! Ŝi opinias ke homoj tro supraĵe parolas pri Dio. La iniciatintino invitas al vivopraktiko en kiu centras kompato, kompato al homoj reciproke, sed ankaŭ al nacioj. Ŝi alvokas labori por la bono de ĉiuj homoj, energie, ade, proksime kaj malproksime. *"Ne parolu inter vi malbonon, nek en la privata nek en la publika vivo, nek pri via eksedzino nek pri la lando kontraŭ kiu via lando militas."* Ŝi proponas senlace aktivi por tiu celo, t.e. mondo pli humana kaj tolerema, estonteco pli suna kaj feliĉa!

Ĝis nun la Ĉarton subskribis jam aro da religiaj gvidantoj kaj influhavaj, bonreputaciaj homoj en pluraj landoj. Karakterizas la tekston, ke ĝi ne mencias la rajtojn kaj devojn de aliaj, sed alvokas ĉiun el ni doni emfazan lokon al kompato kaj indulgo, al solidareco, pardonemo kaj repaciĝo, en nia propra vivo. Tio, kompreneble, tute ne estas simpla tasko. Klopodante oni spertos ke facile leviĝas malaj sentoj, kiel kondamno, malaprobo kaj posedemo. Ni rimarkos ke kompato petas konstantan atentemon vidi la suferojn de aliaj sub (propraj) okuloj, vere kaj fare ion entrepreni, dividi nian panon, nian mantelon, nian tegmenton, esti kiel fratino aŭ frato por niaj proksimuloj. Kompato ŝajne ludas tro modestan rolon sur la scenejo de la mondo, kaj ĝi certe ne estas la elirpunkto de la ekonomio. Eĉ socialaj sistemoj ofte pli temas pri

rajtoj kaj devoj ol kreas novajn formojn inspiritajn de kompato. Ankaŭ en religiaj rondoj, kiel ĉiu povas ĉirkaŭ si konstati, doktrino kaj dogmoj, tradicioj kaj kutimoj ne malofte havas pli laŭtan voĉon ol kompato.

Estas tre bona afero, ke naskiĝis ĉi tiu Ĉarto, ne pro ĝiaj belaj vortoj kaj pensoj, sed pro tio ke ĝi estas provoko, invito. Decidu ĝin subskribi en la senco de: mi klopodos vivi kaj agi laŭ ĝi! Tial mi tradukis ĝin en Esperanton kaj klopodas ĝin disvastigi inter 'nia diligenta kolegaro'.

*Ĉion ajn , kion vi deziras ,*
*ke la homoj faru al vi,*
*vi ankaŭ faru al ili!*

La principo de kompato aŭ indulgo estas fundamento de ĉiuj religiaj, etnaj kaj spiritualaj tradicioj; ĉiam denove tiu principo apelacias al ni trakti ĉiujn aliajn kiel ni mem volas esti traktataj.

Kompato estas forta motivo nelacigeble nin dediĉi al la suferado de niaj kunkreitoj, forlasi la centron de nia mondo kaj doni ĉefan lokon al aliaj, por juste agi kun la netuŝebla sankteco de ĉiu homo kaj trakti senescepte ĉiun homon absolute digne, prave kaj respekte.

Al tio aliĝas ankaŭ la komisio ke ni evitu, publike kaj private, kaŭzi iun ajn formon de suferado. Perforte agante, malbonigante la vivokvaliton de alia homo, misuzante aŭ neante alies fundamentajn rajtojn, kaj semante malamon per arogantaj esprimiĝoj – eĉ pri niaj malamikoj – ni superfortas la homecon, kiun ni ĉiuj inter ni dividas.

Ni agnoskas ke ni ne sukcesis vivi vivon plenan de kompato kaj ke kelkaj en la nomo de sia religia konvinko entute eĉ pligrandigis la homan suferadon.

Tial ni alvokas ĉiun viron kaj virinon


- refari kompaton la kerno de morala agado kaj religio;
- reiri al la malnova principo ke ĉiu interpreto de skribaĵoj kiu instigas al perforto, malamo aŭ malestimo havas neniun legitimecon;
- garantii la disdonadon de veraj kaj respektplenaj informoj pri aliaj tradicioj, religioj kaj kulturoj al gejunuloj;
- stimuli pozitivan aprezon de kultura kaj religia diverseco;
- kontribui al kunsento, bazita sur kono, pro la suferado de ĉiuj homoj, ankaŭ de tiuj, kiujn ni vidas kiel niajn malamikojn.

Gravas esence, ke ni faru kompaton en nia polarigita mondo evidenta, lumanta kaj dinamika forto. Se kompato radikiĝas en principa sinteno firme decidinta nin levi super egoismo, ĝi kapablas malkonstrui politikajn, dogmajn kaj religiajn limojn.

Kiel produkto de nia esenca interdependeco kompato ludas fundamentan rolon interne de homaj rilatoj kaj helpas ebligi plenvaloran homaron. Kompato kondukas al klerigado kaj estas nemalhavebla por realigi honestan ekonomion kaj harmonian mondkomunumon kunvivantan en paco. ᴕ

# Kruco kiel kristana simbolo

Bengt Olof ÅRADSSON, SE



*In hoc signo vinces* — ”En ĉi tiu signo vi venkos”

KIAM MI ANTAŬ unu jaro uzis la supran bildon kiel ilustraĵo sur la fronta paĝo de Dia Regno, unu leganto reagis, ĉar la kruco estis ligita kun milito. Kruco kiel simbolo de kristanismo, kiu funde volas pacon kiel la plej multaj anoj komprenas sian kredon, kompreneble estas iom stranga. Tiu reago igis min iom esplori la krucan simbolon.


Multajn simbolojn ni uzas en nia socio, kiu estas bazita sur la kristana kulturo. Simbolojn kaj gestojn ni uzas ankaŭ en la eklezio kaj la plejmultajn mi nur subkonscie rekonas. Kaj pri krucoj – ekzistas multaj tipoj da krucoj. Mi volas prezenti kelkajn tipojn en tiu ĉi artikoleto. Ĝi neniel estas profunda esploro, ĝi plejparte baziĝas sur informo trovita surrete, inter alie en Vikipedio.

Origine, kiel montris la historiistoj, la *crux* de la latinoj, el la greka σταυρός (paliso, fosto) ne estis krucforma, la *crux* konsistis en vertikala ligna fosto, kiu daŭre restis enfiksita en tero, kaj en la momento de la ekzekutado oni



Relikvujo en la formo de kruco.

metis sur ĝin horizontalan brakon, la *patibulum*, provizita per mortezo en la centro, fiksinte la kondamniton ĉe tiu horizontala trabo. Tiel la tuto estis T-forma. Tamen kiam la formo de tiu kruco iĝis kristana simbolo, tio estis sub formo de "latina kruco" (✟). El tiu baza formo pluraj formoj ekestis: latina kruco, greka kruco, malta kruco, hugenota kruco, kruco de sankta Andreo, lorenokruco, okcitana kruco, ortodoksa kruco kaj multaj aliaj.


Kruco sur frua sveda runŝtono

## Antaŭkristana uzado de kruco-signo

La simpla krucformo, du krucigitaj linioj, estis uzita kaj en la oriento kaj en la okcidento jam longe antaŭ la alveno de kristanismo. Ŝajne oni uzis la signon ne nur kiel ornamentaĵo sed ankaŭ kun religia signifo. Dum la bronza epoko oni trovas la krucojn sur objektoj en multaj tomboj kaj kredeble tiu uzado signifas ke la objektoj estis iel konsekritaj.


Ankh – *crux ansata*

Unu ekzemplon de frua kruco, kiu poste eniris kristanismon pere de la kopta eklezio, ni trovas en la antikva Egiptio. Tie troviĝis la *crux ansata* (ankh) ofte uzata en hieroglifoj kiel signo pri vivo. La ĉefa opinio pri la signifo de tiu kruco estas ke ĝi simbolas i.a. la uteron. Komparu kun la ina-signo (♀) kiu ankaŭ estas la simbolo de la romia diino Venus. En la nuntempa kristanismo tiu kruco signifas la releviĝon de Kristo.


Nuntempa *crux ansata*

## Fru-kristana uzado

Dum la du unuaj jarcentoj de la frua kristanismo, la kruca simbolo ne estis multe uzata. Tiam la kruco signifis konscie doloran kaj publikan ekzekuton. Plejmulte la fruaj kristanoj uzis la simbolon de fiŝo (greke Ιχθύς – Iĥtis – estas la akronimo por "Jesuo Kristo, Dia Filo, Savanto" laŭ la greka alfabeto).


Iĥtis (Ιχθύς)

La simbolo de la kruco tamen estis ligita kun kristanoj jam dum la dua jarcento laŭ kelkaj fruaj historiistoj Octavius kaj Minucius Felix. Tiu ligo inter kruco kaj kristanoj ankaŭ montriĝas per la fakto ke Klemento de Alexandrio (li mortis ĉirkaŭ 215) ofte uzis la frazon "la signo de Kristo" aludante pri la kruco, ne timante ke ĝi estu miskomprenata. Tertuliano raportas en 204 ke kristanoj gestsignis la krucon sur iliaj fruntoj.


La *Chi-Rho*-simbolo sur argenta medalo

Interese, ankaŭ la juda enciklopedio raportas ke la kristanoj plej laste je la dua jarcento ekuzis la krucan gestsignon sur sian frunton aŭ sian bruston kiel ŝirmilon kontraŭ la potenco de demonoj.

Alia uzata simbolo de tiu tempo estas la *Chi-Rho* monogramo, formata per la grekaj literoj Chi kaj R. La simbolo estis trovata jam dum la 3a jarcento kaj Konstanteno uzis ĝin dum la kvara jarcento i.a. sur militaj standardoj post la venko ĉe la Pons Mulvius la jaron 312. Diversaj fontoj raportas ke Konstanteno sonĝis ke li sub la signo de la kruco venkos kontraŭ Maksencio (latine Maxentius).



*Chi-Rho* monogramo




Kruco de Jerusalemo

## Nuntempa kristana uzado


La kruco memorigas nin pri la Amo de Dio en la ofero de lia Filo sur la kruco sur Golgoto. Ĝi memorigas la kristanojn ke Jesuo venkis la morton kaj la pekon per sia morto kaj sekva releviĝo.

> Kaj vin, kiuj estis malvivaj per viaj eraroj kaj la necirkumcido de via karno, Li vivigis kun li, pardoninte al ni ĉiujn erarojn; elviŝinte la dekreton kontraŭ ni en ordonoj skribitan, kiu estis al ni malfavora, kaj li forprenis ĝin el la mezo, najlinte ĝin al la **kruco**; kaj foriginte de si la estrecojn kaj la aŭtoritatojn, parade malkaŝis ilin, triumfante super ili en ĝi. (Kol 2,13-15)




Anglikana kruco

Kiel supre menciite, jam dum la tempo de Tertuliano, kristanoj faris krucajn gestsignojn sur sin. Tio estas kutimo ankaŭ nun precipe ĉe la rom-katolikoj, orientaj ortodoks-uloj kaj kelkaj branĉoj de anglikanoj kaj luteranoj.



Ortodoksa kruco

La romkatolikaj kaj anglikanaj kristanaj eklezioj festas la 14-an de septembro “Laŭdego de la sankta kruco”. La festo memorigas pri la kruco, sur kiu Jesuo Kristo mortis en la jaro 33, la instrumento, laŭ la fido de kristanoj, de la savo de la homaro – sed samtempe la simbolo de la homa krueleco, kiun Dio venkis en sia Filo.



Kruco de sankta Andreo

La daton de tiu festo kaŭzis la patrino de la imperiestro Konstanteno, Sankta Helena, kiu, laŭ la legendo, trovis la veran krucon kiam ŝi faris pilgrimon al Jerusalemo. Kvankam, ĉar ŝi iris al Jerusalemo komence de la kvara jarcento post Kristo, oni devas kredi, ke se ŝi trovis la

veran krucon (kiun neniu konservis kiam Jesuo mortis), ĝi estus vere miraklo – sed miraklo por kiu oni ne trovis grandan kialon.

Tamen, hodiaŭaj kristanoj observas tiun feston por memori la krucon de Jesuo kaj tutan ĝian signifon por la homaro, kaj ne la (mitan aŭ ne) trovaĵon de Sankta Helena en Jerusalemo.

Sur tomblokoj krucoj ofte estas uzataj kiel tombŝtonoj, kaj krucoj estas videblaj ankaŭ ĉe lokoj kie okazis akcidentoj.

## Krucaj formoj

La kruco aperas en diversaj formoj, tipoj kaj grandecoj. Ĝi estas uzata en multaj cirkonstancoj, ekzemple kiel persona juvelaĵo aŭ sur preĝejaj turoj. La kruco aperas malplena aŭ kun fiksita figuro de Kristo (t.e. krucifikso). La uzantoj de la krucifikso volas montri ke Jesuo estas pli grava ol la kruco kiam la uzantoj de la malplena kruco (plejparte protestantaj branĉoj) volas montri ke Jesuo resurektis.

Apude vi vidas kelkajn diversajn tipojn da krucoj.

- **Latina kruco** – la plej kutima formo.
- **Greka kruco** – kutime uzata dum la 4:a jc.
- **Malta kruco** – La ok pintoj reprezentas laŭ lastaj klarigoj, la ok beatecojn de la surmonta parolado de Jesuo. Ĝi estas kaj la emblemo de la katolika ordeno de Malto kaj de la protestantaj Johanitanoj.
- **Hugenota kruco** – kutima ĉe francaj reformitoj
- **Kruco de sankta Andreo** – laŭ la legendo sankta Andreo estis krucumigita sur tia kruco.
- **Lorenokruco** – sub la nomo *Patriarka kruco* venis al Francio de la Bizanca Imperio, Hungario kaj Slovakio, iĝis simbolo de Loreno, kaj dum la Dua mondmilito tiu de la gaullismaj anoj de la rezistado kontraŭ la naziaj okupantoj.
- **Ortodoksa kruco** – la suba oblikva trabo estas piedapogilo laŭ la ortodoksa eklezio.
- **Kruco de Jerusalemo** – tiun signon donis la papo Urbano II al la kruckavaliroj
- **Papa kruco** – la tri traboj montras ke la ofico estas pli altranga ol tiu de ĉefepiskopo




Latina kruco



Greka kruco




Malta kruco



Hugenota kruco



Loreno kruco aŭ patriarka kruco



Papa kruco

# Diservo kaj grupoprocezo

Bengt Olof Åradsson, SE


Antaŭ unu jaro mi promesis skribi artikoleton pri miaj pensoj rilate al la diservo kaj la grupa procezo. Do, nun mi volas plenumi mian promeson. La enhavo en tiu ĉi artikolo estas diskutebla, precipe pro la fakto ke ni venas el diversaj tradicioj, konfesioj kaj havas variajn spertojn. Mi kompreneble multe ĝojus se vi leginte la artikolon sendos al mi viajn reagojn kaj observojn aŭ eble pli bonan analizon kaj kompletigojn. Mi konscias ke mankas multaj vidpunktoj en mia pensado.

Unue mi volas klarigi ke miaj ekleziaj spertoj baziĝas sur la evangelia-luterana tradicio. Krome, mi unue estis membro en la Sav-armeo kaj poste en la Sveda Misia Eklezio (libera traduko) kaj ĉiam paralele mi estis membro en la Sveda Eklezio. La Sveda Eklezio estis ĝis 2000 forte ligita al la ŝtato kaj proksimume 70% de la sveda loĝantaro estas membroj en ĝi. La Sav-armeo kaj la Sveda Misia Eklezio (SME) nomiĝas liberaj eklezioj ĉar ili formiĝis ekster la Sveda Eklezio.

Partoprenante en diversaj diservoj kaj eĉ gvidante kelkajn, mi ekinteresiĝis pri niaj diservaj formoj. Mi komencis demandi min "Kial ni tiel agas en la diservo? Ĉu ekzistas iaj bazaj kristanismaj reguloj aŭ nur ekleziaj tradicioj? De kie venas tiuj tradicioj kaj kial ili formiĝis?

Eble la plej fundamenta demando, kiun mi fakte antaŭe ne klare formulis, estas: "Ĉu tiel aŭ tiel devas fari por plaĉi al Dio?" Iam mi legis ke Dio atendas nin en la preĝejo dimanĉe! Ĉu vere? Tiuj kiuj pro sia laboro ne povas veni aŭ tiuj kiuj pro zorgo pri bestoj aŭ kampara laboro en streĉaj momentoj devas labori, ne povas partopreni en diservo, ĉu ili en sia laboro ne faras servon al Dio? Mi supozas ke iu pastoro simple deziris pli da partoprenantoj dum siaj diservoj. Do multaj demandoj pri la Di-servo, niaj kutimoj k.t.p venis en mian kapon la lastajn jarojn.

Kiel ligi la diservon kun la grupa procezo? Mi ne bone memoras kial unue tiu ligo pensigis min. Eble nur simple



ĉar la diservaj partoprenantoj similas al grupo. Ili kolektiĝas je sama tempo en sama loko kaj havas kelkajn ĉefajn komunajn valorojn. Dum la 2000 jaroj kiuj jam pasis, la kredantoj kolektiĝis kaj festis Sed ĉu ili estas grupo aŭ nur aro da homoj? Sube mi revenos al tiu temo.

**La Sveda Eklezio havas** sufiĉe striktan liturgion sed la Sav-armeo same kiel la Sveda Misia Eklezio havas multe pli liberan diservan formon kaj ĝi baziĝas parte sur la tradicio de la loka preĝeja komunumo, parte laŭ la inspiro de la gvidanto kaj parte ankaŭ sur la tradicio de la kongregacio kaj espereble ankaŭ laŭ la bezono de la diservaj ĉeestantoj.

Kiam mi iom serĉis informon pri liturgiaj eroj, trafis min ke multajn historiajn faktojn ni ordinaraj "diservantoj" tute ne konas. Mi pensas ekzemple pri la kredkonfeso, kiu servas kaj kiel konciza resumo de nia kredo kaj kiel distingilo de aliaj ne-akcepteblaj kred-tendencoj, kiuj troviĝis samtempe je la unuaj jarcentoj de la kristanismo. Mi pensas ankaŭ pri la psalmo antaŭ la prediko kiu en la liturgio de la Sveda Eklezio nomiĝas *Gradualpsalm* (germane Graduallied) kiu montras la momenton dum la diservo kiam oni en pli fruaj epokoj portis la Biblion de unu loko al alia. En pli liberaj eklezioj oni kutime nomas tiun kanton la *laŭdan kanton* kaj en kelkaj lokoj kie mi estis membro, ni anstataŭis tiun psalmon per koruso aŭ solisto. Mi ankaŭ pensas pri la liturgiaj koloroj kaj la reguloj en la Sveda Eklezio kiuj priskribas kiel florornamenti la preĝejon.

Do, troviĝas multaj eroj en niaj diservaj formoj, kiuj havas sian signifon kaj servas diversajn aferojn, sed, laŭ mi, multaj el ni partoprenantoj ne scias pri tio kaj do tiuj eroj ankaŭ perdis sian rolon, almenaŭ parte. Kiun celon kaj sekve kiun formon nia hodiaŭa diservo havu por ke ĝi ludu sian rolon?

Okazis ŝanĝoj dum la pasinta jarcento. La 2-a Vatikana Koncilio (1963-1965) konfirmis tendencojn, en la Romkatolika Eklezio, pri novaj formoj kiu respegulas pli originaj kaj "puraj" formoj. Tio ankaŭ influis la protestantan kristanismon kaj la Svedan Eklezion kaj ties liturgian gvidlibron. Grava kaj baza penso en la nunaj diservaj liturgioj estas ke la ĉeestantoj partoprenu en la diservo kaj ne nur estu objekto. La diservo estu komuna agado inter ĉiuj ĉeestantoj kaj ne nur farita far profesiuloj. Ekzemplo estas ke pli da agado estas *versus popolum* kaj ne *ad orientum.* Tio signifas ke la pastoro turnas sin al la ĉeestantoj kaj ne al la oriento.

**Do al mia baza temo**, kial mi volas ligi la diservon kun la grupa procezo. Ĉu eblas ke la diservo havu la rolon por pli forte formi la interrilatojn inter la ĉeestantoj, do baze la loka komunumo?

Unue mi volas memorigi vin pri la mallonga skizo pri la grupa evolua procezo, kiun mi publikigis en Dia Regno numero 2/2009. Tie mi uzis la FIRO- modelon laŭ kiu la grupo devas trapasi tri stadiojn por funkcii kiel efika grupo. Tiuj stadioj estas aparteneco, kontrolo/rolserĉado kaj interligiteco.

Gravaj punktoj kiujn la grupo devas pritrakti, ĉefe en la unua stadio estas la jenaj: komuna celo, reguloj, koni unu la alian kaj bazaj valoroj.

Kiel apliki tion en la diservo? Ĉu eblas nomi la partoprenantojn dum la diservo *grupo?* Ni komencu per la gravaj punktoj, kiujn mi menciis supre:

- *Ĉu la partoprenantoj konas unu la alian?* Jes kaj ne, depende kiel granda estas la eklezio. Ni vidas grandan diferencon inter la pli malgrandaj liberaj eklezioj kaj la granda Sveda Eklezio. En la malgrandaj komunumoj oni bone konas unu la alian kaj en multaj lokoj oni ĉiudimanĉe kaftrinkas post la diservo en familia etoso. Eble nur 50-100 personoj aŭ ĝis 200 membroj ekzistas sed nur parto el ili estas aktivaj. Kontraŭe oni povas facile esti "anonima" en la Sveda Eklezio, kiu nombras multe pli da anoj. Sed praktike la ĉiu-dimanĉaj partoprenanto iom post iom ekkonas unu la alian ankaŭ en la Sveda Eklezio. Tiu punkto do helpas formi grupon.
- *Ĉu la diservo donas strukturon kaj regulojn?* Jes, sed la strukturo de la diservo ne tute similas unu la alian kaj povas varii inter diversaj dimanĉoj, depende de la gvidanto. La strukturo de la Sveda Eklezio estas multe pli formala kun malgrandaj variaĵoj. Ofte oni ricevas ankaŭ la diservan strukturon surpapere por pli facile sekvi kio okazas kaj partopreni en komunaj programeroj. Al tiu strukturo apartenas ekzemple informo pri la celo de la monkolekto, kiu ludas la orgenon aŭ kiu solkantas. Tiu strukturo helpas min kiel ĉeestanto "aparteni" en la komunumo, do helpas formi grupon laŭ la modelo.
- *Ĉu la partoprenantoj havas samajn bazajn valorojn?* Plejparte jes, laŭ mia opinio. Kompreneble ekzistas ankaŭ diversaj opinioj pri gravaj punktoj kaj mi facile povas mencii geedziĝon inter samseksuloj, aborton, virinajn pastorojn aŭ sinteno rilate Israelo-Palestino nur por montri kelkajn aferojn pri kiuj ne ĉiuj samopinias en la sama preĝeja komunumo. Antaŭ multaj jaroj mi spertis tion, post kiam mi partoprenis en studvojaĝo al Israelo kaj Palestino kaj poste faris malgrandan ekspozicon en nia loka preĝejo. Mi ricevis multajn diversajn reagojn pro tio. Ne nur pozitivajn.

Grava ero kaj tradicio en la diservo, kiu fortigas niajn komunajn valorojn estas la komuna kredkonfeso kiun ni kune kaj laŭte esprimas. Sed kutime ni ne pritraktas tiajn temojn, ĉar ili povas esti iom tiklaj. Do, laŭ mia kompreno, tiuj eklezioj kiuj kuraĝas pritrakti tiajn temojn iom post iom formas pli fortan komunumon, inter alie ĉar nur tiuj kiuj samopinias kun la "predikata instruo" restas. La aliaj serĉas alian komunumon. Pro timo perdi anojn, oni riskas ke la "instruo" estas pli malforta kaj senenhava. El tio sekvas ke ebla grupo malfortiĝas. Ekstreman situacion ni trovas en sektoj, kie la "instruo" estas forta, postuliga, senescepta. Tie ni trovas grupon kun fortaj interligoj inter la

membroj.

Parolinte kun kelkaj pastoroj mi spertis ke ili havas du celojn aŭ respondecojn en sia ofico. Almenaŭ la pastoroj en la liberaj eklezioj. Tiuj du estas: prediki la evangelion kaj gardi la komunumon. Tiuj du celoj influas kaj la ĉiutagan laboron kaj la predikon kaj la diservon. Ni venas al mia kvara punkto kiu temas pri la celo.

- *Ĉu la aro da partoprenantoj havas komunan celon?* Tiu ĉi punkto estas laŭ mi la plej grava kaj la demando estas plurflanka. Ĉu la diservo havas iun precizan celon? Nuntempe troviĝas multajn diverspecajn renkontiĝojn kaj diservojn. Povas esti Biblia studado, Diservo kun la Sankta Manĝo, Familia Diservo ktp. Sed tamen mi plejofte sentas ke la diservo ne havas precizan celon. Mi havas la senton ke oni "produktas" la kutimajn ritojn, kantojn, predikas sen iu preciza celo.

Kion mi faru elirinte la diservon? Ĉu mi havas taskon kiun mi devas fari ĝis sekvontsemajne kiel atestanto de Kristo? En kiu maniero mi evoluis dum la diservo? Ĉu tiu evoluo estis hazarda aŭ gvidata per la diservo? Plejofte mi sentas ke ni nur simple pli bone fartas, esti ano en societo kun konatuloj. Okazas ke post diservo mi hejmeniras pensante ke la diservo estis bona momento mense ripozi, ke mi ĝuis la konatajn kantojn aŭ koruson sed se ne estis la post-diserva kaftrinkado, mi eĉ ne povis ĝui la societon.

**Io eraras en la argumentado, ĉu ne**! Aŭ ĉu vi havas aliajn spertojn? Mi iom lasis mian okupiĝon pri la temo kiam mi renkontis tiun malfacilaĵon, sed tamen ne tute. Iom streĉante la modelon mi nuntempe pli multe opinias ke la grupo ne formiĝas per la tuta ĉeestantaro sed ĝi formiĝas per la plej malgranda "grupo" ebla – la dupersona rilato inter mi kaj la Sinjoro.

Mi venas al la diservo kaj tra la diservo mi formas mian rilaton kun mia Sinjoro. La liturgiaj eroj kondukas min, paŝo post paŝo al pli bona rilato: ekkoni unu la alian, forigi baraĵojn inter ni, senti ke Li amas min kaj volas mian rilaton.

Tamen – por ke tiu funkciu, mi devas prepari min. Prepari min antaŭ la diservo, ĉar la diservoj kutime estas mallongaj. Estas malfacile veni al la diservo kaj tuj formi mian rilaton. Aŭ mi devas antaŭ la diservo, en mia propra situacio, iom mense ektrankviliĝu aŭ havu sufiĉe da tempo dum la diservo, dum la kantoj, dum la koruso, preparu mian animon. Alie mi riskas ke mi simple "legas" la pardonpeton, "legas" la kredkonfeson kaj ne el mia profundo elparolas ĝin.



**Estas interese sekvi la evoluon** en diversaj liberaj eklezioj en Svedio. Pro la fakto ke multaj preĝejaj komunumoj perdas membrojn, oni aŭ kunlaboras loke, eĉ formale, aŭ serĉas tute aliajn manierojn fari siajn diservojn. En la numero 5/2007 Brita Rehm priskribis la manieron ĉe sia eklezio. Ili komencas per kaftrinkado(!) ĉe malgrandaj rondaj tabloj kaj tiel faciligas kontakton kun fremduloj kaj post iom da enkonduko, la diservo daŭrigas kaj finas per la Sankta manĝo. En unu numero de eklezia gazeto mi legas pri alia ekzemplo. La lastajn jarojn malgranda preĝeja komunumo povis bonvenigi ĉirkaŭ dek novajn membrojn jare. Tiu transformiĝo parte okazis ĉar ili lumigis kaj plibonigis la socian flankon de la eklezio. Havinte pli bonajn internajn rilatojn ili rimarkis ke pli multaj homoj partoprenis la diservojn kaj eĉ novaj personoj membriĝis. Eble la anoj iĝis vivantaj leteroj de Kristo (2 Kor 3,3) *"ĉar vi montriĝis, ke vi estas letero de Kristo liverita per ni, skribita ne per inko, sed per la Spirito de la vivanta Dio; ne sur ŝtonaj tabeloj, sed sur la karnaj tabeloj de la koro."*

**Konklude** mi opinas ke dum la diservo intermiksiĝas minimume tri tavoloj aŭ flankoj de nia bezono. Unu flanko estas mia homa kaj socia bezono de interrilato kun samkredantoj, due mi bezonas zorgi pri mia rilato kun mia Sinjoro, kaj trie la formado de taska grupo por disvastigi la evangelion aŭ evoluo de mia kredo. Tute ne sciante pri la pensoj de la pastoroj, mi povas imagi la problemon kaj intermiksi kaj distingi inter la diversaj celoj ĉar plejofte la pastoro nur unu-foje semajne renkontas la eklezianojn.

ﬁ

## El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus




**1. aprilo**

Ĉiela Patro, malfermu miajn okulojn por la mirindaĵoj de Via boneco. Ili ja fariĝis jam tute kutimaj por mi. Mi tutkore laŭdu Vin pro ili, kaj mi ĉiutage denove miru pri ili.

Tiun-ĉi libreton Vi povas mendi ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso sur paĝo 26). Per la aĉeto Vi subtenos agadon Evidente de J. Tuinder.

# Ŝercoj kolektitaj (2)

Mu Binghua, Ĉinio

- **“Ĉu vi estas** sinjoro Daguang?” “Ne”, mirigite respondas la alia. “Mi ja estas sinjoro Daguang,” klarigas la demandinto, “sed vi ĵus vestas vin per ties mantelo!”

- **Labortago jam finiĝis,** sed dungito ne iras hejmen kaŭre trinkas vinon en sia laborejo. Paŝinte tien, la mastro lin demandas: “Vi estas tiel ĝoja, do kian bonan aferon vi renkontis?” “Ha, sinjoro, mi gratulas min pro tio, ke antaŭ dek jaroj vi plialtigis mian salajron.

- **En drinkejo najbare** sidanto demandas viron: “Ĉu vi havas multajn drinkemajn amikojn?” “Mi havis antaŭ ol elĉerpiĝis mia mono!

- **En ekspozicio** vizitanto longe staras antaŭ memportreto de fama pentristo. Fine li diras al sia amiko: “Vidu, li havas siajn manojn en la poŝoj. Kiel li do povis pentri sin?”

- **Virino en ŝuvendejo** volas aĉeti paron da botoj; ŝi elektadas kaj elektadas, fine diras decideme al la vendistino: “Mi prenas la paron, kiun vi montris al mi unue.” Tuj replikas la vendistino: “Pardonu, sinjorino, ne eblas; tiu paro estas forvendita jam antaŭ unu horo.”

- **Instruisto skribis** en notlibro de lernantino: “Dum leciono eta Hong parolis tro multe.“ La patro de la knabino legas kaj mem skribas en la notlibro: “Se vi konus ŝian patrinon vi nepre ne mirus pri tio.”

- **“Ĉu denove vi** vizitos la koncerton:” mire demandas la edzo. “Sciu, ke la hodiaŭ prezentotaj programeroj estas tute samaj kiel hieraŭ!” “Jes. Mi scias,” diras la edzino. “Sed hodiaŭ mia robo tute ne estas tiu kiun mi portis hieraŭ.”

- **“Kial vi aŭdacis** kontraŭstari policanon?” krie demandas juĝisto la akuziton. “Li postulis kvindek juanojn. Sed mi kontraŭstaris, proponante nur dekdu juanojn.”

- **Turisto volas donaci** al sia ĉiĉerono memorindaĵon, sed ne scias kion ŝi ŝatas. “Ho, mi ŝatas min beligi. Bonvolu donaci al mi ion, kio rilatas al miaj oreloj, fingroj aŭ kolo ...” La turisto kuris al butiko kaj revenis kun — tualet-sapo.

# Informetoj

## Bibliaj Tagoj en Munster

Psalmo 133, kanto de suprenirado. De David.

1 Jen, kiel bone kaj ĉarme estas, Se fratoj vivas kune!
2 Kiel la bona oleo, Kiu de la kapo defluas sur la barbon, la barbon de Aaron,
Kaj defluas sur la randon de lia vesto;
3 Kiel la roso, Kiu de Ĥermon malleviĝas sur la montojn de Cion;
Ĉar tie la Eternulo donas la benon, Vivon por eterne.

EKDE LA 3-A ĝis la 7-a de marto 2010 okazis Bibliaj Tagoj en la antaŭurbo de Munster, norda Germanio. Bibliaj Tagoj okazas ĉiujare kutime en marto en diversaj germanaj urboj. Kunvenis ĉirkaŭ 20 personoj el Germanio, Nederlando, Belgio kaj Slovakio. Ni povis ĝui agrablan antaŭprintempan veteron en tre bela domo Mariengrund (Maria-loko), kiu apartenas al Schonstatt-movado.


Antaŭtagmeze okazis tre interesaj prelegoj de benediktana patro Wilibald Kuhnigk, kiu komparis duakanonajn librojn de Saĝeco kaj Siraĥido kaj posttagmeze estis tempo por promenoj en la ĉirkaŭaĵo kaj en la historia urbo Munster, sed ankaŭ por komuna kantado kun ADORU – ekumena kant- kaj preĝlibro. Ni denove povis agnoski, kiel altvalora trezoro estas ĉi tiu unika libro. Ni eĉ praktikis novajn kantojn, kiuj aperis post la publikigo de ADORU.

Ĉiutage okazis ankaŭ sanktaj mesoj en Esperanto kun diversaj temoj (por la unueco de kristanoj, viva akvo, pri Maria, ktp). Unu meson partoprenis eĉ la fratulinoj, kiuj vivas en la domo Marienburg kaj kelkaj el ili interesiĝis pri Esperanto.

Dankon al P. Bernhard Eichkorn, kiu jam multajn jarojn organizas Bibliajn Tagojn, al P. Albrecht Kronenberger, kunaŭtoro de ADORU kaj Stefan Lepping, kiu majstre akompanis nian kantadon per orgeno kaj gitaro.

Dankon al ĉiuj partoprenintoj, kiuj komune estigis tre belan frataman etoson.

Ni denove povis konvinkiĝi, kiel bone kaj ĉarme estas, se fratoj vivas kune (La Psalmaro 133:1). Estis belege komune laŭdi kaj glori Dion en ĉi tiu karesma tempo. Unu Dio, unu animo kaj unu lingvo kunigis nin.



PASTRO DUILIO MAGNANI forpasis la 20-an de aprilo en Rimini (Italio). Li naskiĝis la 11-an de junio 1928. Magnani fariĝis sacerdoto en 1953 kaj laboris kiel paroĥestro ĝis 2003. En 1969 li sukcese trapasis la unuagradan ekzamenon de Esperanto. Li estis membro de UEA ekde 1974 kaj delegito ekde 1978.

Magnani aktivis en Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE), kies prezidanto li estis de 1979 ĝis 1995. Grandaj atingoj dum lia prezidanteco estis la oficiala agnosko de IKUE kiel privata internacia asocio de fideluloj fare de la Sankta Seĝo, aprobo de la Esperanta Meslibro kaj, en 1994, la enkonduko de la jam tradiciaj salutvortoj en Esperanto fare de la Papo je kristnasko kaj pasko. Grava parto de la aktivado de Magnani estis lia helpagado por esperantistoj en orienteŭropaj kaj evoluantaj landoj, precipe en Afriko. Pro tiu agado UEA distingis lin en 2007 per la prestiĝa Premio Onisaburo Deguchi.

En sia preĝejo en Rimini Magnani realigis Esperantajn kaj itallingvajn artajn mozaikojn. Per kontaktoj kun gravuloj de la civila kaj religia mondo li ofte akiris subtenon por Esperanto. En 2005 Magnani fariĝis Honora Membro de UEA.

Els van Dijk-Kuperus

NIA MEMBRO EN Usono, Donald Wilson Houpe, forpasis la 20an de aŭgusto 2008 en la hospitalo de la Universitato de Norda Karolino, Usono. Li havis la aĝon de 67 jaroj. Li naskiĝis la 29an de novembro 1940 en Farmville, Virginio.

Amikece via, Jerry Veit

# Amo neniam pasas

La ŝtono estas forta,
sed ĝin disrompas la fero.

La fero estas forta,
sed ĝin knedigas la fajro.

La fajro estas forta,
sed ĝin estingas la akvo.

La akvo estas forta,
sed ĝin vaporigas la suno.

La suno estas forta,
sed ĝin mallumigas la nubo.

La nubo estas forta,
sed ĝin dispelas la vento.

La vento estas forta,
sed ĝin rezistas la homo.

La homo estas forta,
sed lin teren batas la morto.

La morto estas forta,
sed pli forta ol la morto
estas la amo.

La amon neniu nenio venkos!

La poemon de nekonata aŭtoro
tradukis Jacques Tuinder.